

## & Kata logo:

< Ripete 50 sed rekante 48 el 67 batoj por strofo, entute 402 paŝoj dum 5 minutoj.  
Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016)  
per ŝotisa melodio sveda kaj parte nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:67> (/DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo dodo dodo; DoDo MiSo dodo LaSo; dodo  
LaSo TiTi TiTi; SoSo

(#Rekantaĵe: Tire fafa mire; fafa mire so so;)

(#Ripetaĵe: sola somi fare Tire dodo doTi do omi;)

(#Rekantaĵe: so somi domi So; so somi domi So; mi redo mimi redo mire redi re emi;  
fa fare Tire So; fa fare Tire So; fa mire so mi redo doTi dore do do o)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 /Se vi pipon vire fumas, ; Sen intesta  
embaraso, ; Kaj soife okulumas ; Al  
belŝaŭma bierglaso, (':; Jen vi

(×:; **estas taŭga frato ; De la Verda  
Kato!**)

(,;:; Jen vi estas taŭga frato ; De la  
Verda Kat'!)

(×:; **2× (Paŝu nun en la danc'! ; )×2  
kaj estu taŭga frato ; de la Verda  
Kato!**)

'2 Se vi povas dum diboĉo, ; Kiel sana  
filozofo, ; Kanti per miaŭa voĉo; Ĝis la  
fina kata strofo, ; Jen vi .....

'3 Se vi scias per mokvorto ; Ŝerci pri  
respekta moro, ; Se vi povas ĝis la  
morto ; Nutri vin per bonhumoro, ; Jen  
vi .....

'4 Sed!! Se peze kun prediko ; Vi  
grumbladas primoralo ; Kaj pro  
konscienc-koliko ; Manĝas herbojn nur  
sen salo, ; Vi ne .....

'5 Se vi prude kaj sendistre ; Ŝatas mola  
sur kanapo ; Ronki pace kaj filistre ;  
Kun pantofloj kaj noktĉapo, ; Vi ne .....

'6 Se anstataŭ eĉ absinton ; Trinki freŝe  
el botelo ; Vi preferas suĉi pinton ; De  
malseka pluvombrelo, ; Vi ne .....